



Havana Karavano

KONGRESA KURIERO DE LA 95-A UNIVERSALA KONGRESO

N-ro 1

Dimanĉo, 18-a de julio 2010

Saluton, kongresanoj!

Kiel dum ĉiu Universala Kongreso, UEA kaj LKK ankaŭ ĉi-jare eldonas tagan ĵurnalon, tradicie konatan kiel la Kongresa Kuriero, kaj por la 95-a UK aperontan kun la nomo *Havana Karavano*. Ankaŭ same kiel ĉiukongrese, ĝia enhavo dependos tre grandparte de la kontribuoj de la kongresanoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj kunvenoj, recenzi kongresajn eventojn ktp, kaj poste aŭ meti siajn pecojn en tiucelan skatolon ĉe la kongresaj giĉetoj, aŭ liveri ilin ĉe la KK-redakciejo en ĉambro Ortiz. Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel kongresaj anekdotoj, rakontoj, kaj eĉ tutaj volontuloj. Ĉiuokaze bonvenon al Havano, kaj ĝuu la kongreson!

La redakcio

Unu homo, unu libro, unu horo

Unu homo : prof. Lee Chong-Yeong, en Esperantujo konata simple kiel Chong. Unu libro: *Lee Chong-Yeong, gvidanto nia*, eldonita de Korea Esperanto-Asocio. Unu horo: la tempo kiun ni pasigos kune en la libroservo por omaĝi al prezidinto de UEA, konante lin pli bone per la vortoj de tiuj kiuj plej intime kunlaboris kun li kaj/aŭ kiuj plu antaŭenigas liajn ideojn: Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin kaj aliaj. Do venu ĉiuj al la libroservo dimanĉon la 18-an de julio, je 16h15.

Michela Lipari, KN 411

Ateistoj malfermaj

La administra kunveno de ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo), kiu okazos dimanĉon 16h00-16h45, estas indikita en la kongresa programo kiel "fermita". La kunveno tamen estas malfermita al la publiko, sed bonvolu noti ke tio estos administra kunsido, ne diskuto pri ateismo.

Por informoj pri ateismo venu al la publika kunveno, ĵaŭdon 15h30-16h30. La temo de la kunveno estos: "Kio estas la celo de la vivo, laŭ ateistoj?"

Anna Löwenstein, KN 849

Ekzameniĝu novtipe!

Novaj UEA-ekzamenoj, konstruitaj laŭ la aŭtoritata t.n. Eŭropa Referenckadro, funkcias ekde decembro 2008. Ĝis nun trapasis ilin 186 personoj el 31 landoj. Al la 13-a ekzamensesio, okazonta dum tiu ĉi UK, ankoraŭ eblas aliĝi dum la semajno.

La ekzamenoj okazas en tri niveloj: B1 (baza), B2 (meza) kaj C1 (supera). Ili konsistas el skriba kaj parola partoj, trapaseblaj ankaŭ aparte en diversaj ekzamenperiodoj. Ankaŭ eblas ekzameniĝi nur pri unu parto. La ekzamenoj testas nur lingvajn konojn kaj kapablojn, ne entenante movadajn aŭ kulturajn informojn.

La skriba ekzameno okazos vendredon je la 11h00, kun la parola parto poste aŭ alitage laŭ interkonsento. Eblas aliĝi ĝis la 9-a horo en vendredo. Ĉiujn ceterajn informojn, aliĝeblojn kaj pageblojn vi trovas en la Kongresa Libro pri la aranĝoj de edukado.net (p. 46) aŭ ĉe la giĉeto de la kasisto de UEA.

Ni atentigas ankaŭ pri tio, ke mardon, kadre de la meznivelaj paroligaj kursoj de edukado.net, okazos informado kaj ekzercado por la ĉi-semajnaj ekzamenoj.

Katalin Kováts, KN 512

La bona lingvo ankoraŭ pli bona

Dimanĉon ja la 13-a horo en salono Canuto (Kanuto) kunvenos la nova asocio Tutmonda Esperanto. La kunveno estas malfermita al tiuj, kiuj kredas, ke Esperanto estas regula kaj sen esceptoj, kaj devas resti tia.

Renato Corsetti, KN 412

Grava informo por prelegantoj kaj gvidantoj de kunsidoj

Ĉiuj memorstangetoj, kompaktdiskoj, DVD-oj kaj projekciotaj komputilaĵoj devas esti testitaj 24 horojn antaŭ la prezento ĉe la teknika centro de la kongresejo, apud salono Hodler. Sen tiu testo ne eblis dissendi la projekciadon.

Kleriga Lundo

lundon la 19-an de julio 2010

UNUA BLOKO: 09h00-10h30

Kiel agi en esperantistaj dezertoj

Renato Corsetti, HORI Jasuo, Martin Schäffer

Ekzistas ankoraŭ multaj landoj en la mondo, kie eĉ unu esperantisto ne ekzistas. Do, la problemoj estas kiel krei esperantistojn tie, kiel verdigi la dezerton. Unu el la sistemoj estas tiu elprovata de la Azia Komisiono (KAEM), sed ankaŭ de aliaj kontinentaj komisionoj de UEA, sendi homon al la lando, kiu gvidu la unuajn Esperanto-kursojn. Oni povas pensi pri alternativaj metodoj, ekzemple anoncoj en lokaj ĵurnaloj, anoncoj pri retaj kursoj. Ĝenerala demando: kiu estas la preferinda metodo por naski Esperanto-movadon en nova lando?

09h00-10h30, *Lapenna*

Japanaj kvadratoj: huroŝiki kaj origami

huroŝiki: TAHIRA Masako; origami: SAIKI Akira

De antikva tempo oni pakis diversajn objektojn per kvadrataj tuko, japane "huroŝiki", por oportune kunporti ilin. Japanaj paktukoj kovras objektojn longajn aŭ mallongajn, grandajn aŭ malgrandajn, rondajn aŭ kubajn, eĉ montrante artismajn nodojn. Kontraste al papero aŭ plasto, tuko estas ekologiisme konvena pro la ebleco ripete uzi. Vi do provu mem paki ion vian per huroŝiki!

Paperfaldludo troviĝas tramonde, sed tiu nomata "origami" prosperis aparte en Japanio. Oni faldas diversajn formojn el diversformaj paperoj jam de malnova tempo, kaj aperis antaŭ 200-300 jaroj multaj fakaj libroj. La bela formo de "orizuru" (gruo faldita el papero) estas kvazaŭ simbolo de japaneca paperfaldludo. Vi do vidu varion da gruoj kaj mem faldu kun ni belan grupon!

09h00-10h30, *Canuto*

Tradukekzerco:

tradukado en multlingvaj medioj

Brian Moon

Ĉiu uzanto de Esperanto pli-malpli ofte konfrontiĝas kun problemoj de tradukado inter Esperanto kaj naciaj lingvoj. Por rigardi tiujn problemojn el iom

nova perspektivo, ni proponas konsideri la situacion en multlingvaj organizaĵoj kiel Eŭropa Unio.

Sur bazo de praktika tradukado de specimena teksto jam ekzistanta en diversaj lingvoj, ni iom esploros la avantaĝojn kaj la problemojn de Esperanto en tiu ĉi kampo.

09h00-10h30, *Jáki*

Ni lernu ludante

Ana Montesinos

Temas ĉefe, sed ne nur, pri manieroj pligrandigi nian scion pri Esperantujo. Unue estos prezento de kelkaj eblaj ludoj, poste oni praktikos ilin en malgrandaj grupoj, kaj je la fino ĉiu grupo raportos siajn komentojn, kaj eblajn novajn ideojn, al la aliaj partoprenantoj.

09h00-10h30, *Broccatelli*

DUA BLOKO: 10h45-12h15

Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko

Humphrey Tonkin

Dum la kongresa semajno, okazos laborkunsido pri la agado de UEA ĉe UN kaj Unesko, sed la celo de la nuna sesio estos iom pli vasta. Ĝi respondos du demandojn: "Kial gravas, ke mi sciu pri UN kaj Unesko kaj subtenu ilin?" kaj "Kion mi povas fari por antaŭenigi Esperanton en tiaj internaciaj medioj?" Membroj de la teamoj, kiuj reprezentas Esperanton en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo prezentos siajn vidpunktojn kaj diskutigos vin.

10h45-12h15, *Lapenna*

Per muzikaj instrumentoj:

viaj talentoj helpas Esperanton

HORI Jasuo

Esperantistoj havas diversajn talentojn. Uzu tiujn por Esperanto. Mi montros al vi unu ekzemplon pri tiu temo.

Lernejoj ne facile akceptas vian proponon instrui Esperanton. Sed se vi proponas "koncerton pri diversaj muzikiloj el la mondo" ili facile akceptos vin. Tion mi faras. Mi ludas japanan tradician muzikilon,

tial kiam mi vojaĝas en eksterlando, mi tuj aĉetas tieajn etnajn muzikilojn aŭ ludilojn. En la pasintaj tri jaroj mi prelegvojaĝis en Francio, kaj dum miaj vojaĝoj tiu koncerto estis la plej populara. Lernantoj estis ensorĉitaj per tiuj nekutimaj muzikiloj, mem ludante.

10h45-12h15, Canuto

Indiĝena turismo

Ruben Ortiz, Philippe Chavignon

Ruben Ortiz, grava gvidanto indiĝena en Gvatemalo, estis la kasisto de la indiĝena konsilantaro de la projekto I.D. "Indiĝenaj Dialogoj". Kiam ĉi lasta kolapsis, li proponis starigi ekoturisman kunlabore kun la indiĝena organizo porvirina "Kichin Konojel", kiun li kun lia edzino estris, kaj kiu peras projektojn pri terkultivado kaj edukado. Nova organizo "AgroEtour" estis kreita por okupiĝi pri la disvolvado de ekoturismo en kaj por indiĝenaj komunumoj. Kunlabore kun Philippe Chavignon, pluraj vojaĝoj en kiuj partoprenis esperantistoj estis organizataj en Mezameriko laŭ spirito de solidara turismo.

Ruben kaj Philippe prezentos la projekton kaj ilustros la rezultojn kaj malfacilaĵojn per siaj konkretaj spertoj.

10h45-12h15, Jáki

Ekonomia Esperanto

Hans Welling

En tutmonda komerco kono de fremda lingvo necesas. La angla estas la plej ofte uzata. Sed ĝi estas ege multekosta. Ni pli intense studu la tre grandan ekonomian avantaĝon de nia lingvo. Por konvinki ne nur kulturajn homojn, sed ankaŭ ekonomiistojn kaj politikistojn, ni devas mem koni niajn avantaĝojn, por ke ni povu ilin klarigi eksteren. Komence de la prelego mi disdonos enketilon. Ni kune klopodu kalkuli !

10h45-12h15, Broccatelli

TRIA BLOKO 12h30-14h00

Publika parolado sen nervozo

Humphrey Tonkin

En la sesio ni penos atingi du celojn. (1) Kiel esperantistoj, ni de tempo al tempo troviĝas en nacilingvaj situacioj, en kiuj ni devas prezenti

Esperanton klare, konvinke – kaj publike. Ni esploros kelkajn metodojn por fari tion. (2) Ankaŭ kiel esperantistoj, ni okaze devas publike paroli en Esperanto. Tio prezentas pliajn defiojn, kies solvojn ni ankaŭ esploros.

12h30-14h00, Lapenna

Kimono: japana popolkostumo sed artaĵo

KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo)

"Kimono" estas japana tradicia popolkostumo, kaj en la nuntempa japana vivo ordinara kimono estas silka elegantaĵo. La nuntempa vestmaniero formiĝis antaŭ ĉ.120 jaroj. La silka ŝtofo por kimono, 36cm larĝa kaj ĉ.10m longa, estas fajne tinkturita, eĉ hodiaŭ mane po unu. "Obi", la silka larĝa zono por kimono, estas 30cm larĝa kaj ĉ.4m longa. Kimono kaj obio ambaŭ estas simple plataj ŝtofoj, sed ili gajnas vivon sur la homa korpo.

Vidu verajn kaj belajn kimonojn kaj obiojn, kiuj estas japanaj artaĵoj tinktura, broda kaj teksa.

12h30-14h00, Canuto

Yumeiho-Terapio en Kubo

Francisco Briel de Cañas, Francel Briel Gil

Yumeiho-terapio alvenis al Kubo dum la 75-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Havano, Kubo en 1990 pere de sia kreinto d-ro Masayuki Saionji, el Japanio. Ni prezentos diversajn kuracitajn kazojn, kelkajn el ili pere de pacientaj atestoj, en kiuj oni povos konstati la bonefikojn de nia terapio. Fine ni elmontrus praktike al partoprenantoj ĉe nia konferenco la bonajn efikojn de nia terapio.

12h30-14h00, Jáki

Kiel igi niajn klubkunvenojn pli interesaj? Programeroj por klubaj kunvenoj kaj por lecionoj por progresantoj

Josef Šemer

Temas pri prelego kun ekzemploj, samtempe instrua, amuza kaj defi-hava. Josef (Josi) Šemer estas multjara gvidanto de la Esperanto-klubo en Tel-Avivo, Israelo. Li kreis kaj prezentis tie diversajn programerojn, kiuj estas samtempe distraj, aktivigaj kaj lingvo-lernigaj. Dum la sesio li prezentos al ni kolekton de tiuj ĉi programeroj kaj riĉigos nin per sia sperto. La materialo taŭgas ankaŭ por lecionoj por progresantoj.

12h30-14h00, Broccatelli

Demandoj rilatantaj la kongresan temon: Interproksimigo de kulturoj

A. Grandaj temoj de Unesko – Kiel ni povos kunlabori?

Unesko deziras antaŭenigi kulturen diversecon en la mondon, kaj la ligojn inter la diversaj kulturoj. Kiel Esperanto helpu atingi tiun celon? Ĉu valoras konservi la lingvojn kaj kulturojn de la mondo? Kiujn aspektojn ni reliefigu kaj konservu?

Ĉu ni povos helpi pri la kompreno de similecoj kaj diversecoj en la mondaj kulturoj?

1) Kiel ni povos faciligi pli da kulturaj interŝanĝoj tra la mondo, laŭ la politiko de Unesko? Kiel ni povos faciligi la deziratan dialogadon aŭ konversaciadon en la evoluigo de politiko por edukado, scienco, kulturo, kaj komunikado laŭ tiuj celoj?

2) Kiel ni povos utiligi Interreton por konversacioj kiuj ŝanĝos perspektivojn pri kulturoj kaj religioj? Ĉu ni povos inkluzivi interreligiajn konversaciojn en nia interkultura dialogado? Kiel ni povos utiligi niajn komunikilojn por dialogi pri delikataj temoj kiuj gravas por la estonteco de nia mondo kaj la interhomaj rilatoj?

3) Kiel ni povos helpi eduki pri homaj rajtoj, kultura diverseco, integrado de marĝenitaj grupoj? Kiel ni kreu konversaciojn inter nordo kaj sudo je ĉiuj niveloj, per interŝanĝoj inter universitatoj, profesiuloj, individuoj?

4) Ĉu estu nia tasko antaŭenigi sciojn pri indiĝenaj popoloj, iliaj vivfilozofioj, interkultura dialogado, luktado kontraŭ rasismo kaj diskriminacio, antaŭenigo de kulturo kaj paco kaj demokratio?

5) Kiel ni povos kontribui al la korektado de miskoneptitaj kulturaj reprezentiĝoj, valoroj kaj stereotipoj?

6) Ĉu ni povos komuniki la valorojn kaj produktojn de aliaj kulturoj per ekspozicioj kaj publikaj eventoj kiujn ni organizu pere de niaj tutmondaj kontaktoj?

7) Ĉu ni povos kontribui al la utiligo de novaj teknologioj kiuj antaŭenigu lingvan diversecon kaj tradukadon? Ĉu Esperanto povos roli pli efike ol aliaj solvoj kiel interlingvo en la aŭtomata tradukado?

B. Aliaj gravaj demandoj por la Esperanto-movado

1) Kiel vi kaj aliaj esperantistoj kiujn vi konas vere uzis la lingvon por kompreni aliajn kulturojn?

2) Ĉu esperantistoj trompas sin kiam ili kredas kaj asertas ke Esperanto ebligas transkulturen komprenon? Ĉu ni urĝe bezonas interkulturen trejnadon kiel esencan parton de nia edukado kiel uzantoj de Esperanto? Ĉu vi spertis problemojn pri interkultura kompreno inter esperantistoj? Se jes, en kiuj cirkonstancoj? Kio estus helpinta eviti tion?

3) Ĉu ni devus ekzameni universalajn kultur-etikajn valorojn kiel akceptitan bazon por interrilati kun esperantistoj kaj la homaro ĝenerale? Ĉu ni provu difini specifajn kvalitojn kaj esprimiĝojn de tiuj valoroj laŭ la diversaj kulturoj por pli bone kompreni ilin? Ekzemploj de universalaj valoroj estus la amo, vero, justeco, libereco, unueco, toleremo, respondeco, kaj respekto al la vivo. Kiujn aliajn ni aldonus specife por la Esperanto-komunumo? Ĉu rolas en tio la “interna ideo”?

C. Aliaj kernaj demandoj

1) Kion signifas interproksimigi kulturojn?

2) Kiel difini kulturon, kaj kulturojn?

3) Ĉu ĉiuj kulturoj egale valoras? Kiel ni difinu kulturajn valorojn?

4) Ĉu malaperos aŭ malaperu etne bazitaj kulturoj?

5) Ĉu Esperanto havas kulturon kun akceptitaj moroj, kutimaro? Kiel difini ĝin?

Ĉu ni estas vera “popolo” aŭ “malpopolo”? Kiel difini nin?

Kiuj estas la “samaj ideoj” kiuj nin kunigas kiel “samideanoj”?

Venu por diskuti pri tiuj ĉi demandoj: dimanĉon 15h00 kaj mardon 13h45, salono Lapenna; ĵaŭdon 10h15, salono Hodler.



La Komitato de UEA elektis en granda unuanimeco

La Komitato de UEA povis efike eklabori en sia unua kunsido en Havano sabaton, la 17-an de julio, ĉar diference de kunsidoj eĉ en pluraj eŭropaj UK-oj, ĝi havis kvorumon tuj je la komenco. Ĉeestis komence 26 komitatanoj; fine de la kunsido la nombro estis jam 36, nome 32 komitatanoj A, 3 komitatanoj B plus unu intertempe elektita komitatano C.

La ĉefa tasko en la sabata kunsido estis la elektoj. La Komitato voĉdonis per sekreta baloto pri la proponoj de la Elekta Komisiono, kiujn ĝi ricevis jam en majo. Unue estis elektitaj komitatanoj C. Ĉiuj ses kandidatoj sukcesis en la voĉdonado. Por Loes Demmendaal voĉdonis 24, kontraŭ 1 kaj 2 sindetenis; Paulo Branco ricevis respektive 21, 4 kaj 1; Jean Codjo 20, 4 kaj 2; Josep Franquesa Sole 20, 5 kaj 1; Stefano Keller 20, 0 kaj 6; kaj Marcel Delforge 19, 1 kaj 6.

Sekvis la elekto de la Estraro por la periodo 2010-2013. Probal Dasgupta estis reelektita kiel prezidanto per 26 por, 2 kontraŭ kaj 4 sindetenoj. Claude Nourmont kiel vicprezidanto ricevis respektive 26, 4 kaj 2 voĉojn, kaj Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario per 27, 4 kaj 1 voĉoj. Same kiel antaŭe, Nourmont plu respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj kaj Pietrzak pri informado. Loes Demmendaal reelektiĝis kiel estrarano pri financo kaj administrado per 28, 2 kaj 2 voĉoj. Tri estraranoj estas novaj: Maritza Guriérrez pri landa kaj regiona agado (resp. 26, 3, 3), Stefano Keller pri eksteraj rilatoj (24, 3, 5) kaj Amri Wandel pri scienca kaj faka agado (23, 5, 4). Kvankam ne en la tuj antaŭa periodo, Gutiérrez estis estrarano jam pli frue dum unu mandato kaj Wandel dum du mandatoj.

Kiel komitataj reviziantoj estis elektitaj Paulo Branco kaj Marcel Delforge unuanime. Ambau ricevis 29 porajn voĉojn; du sindetenis. Simile elektiĝis ankaŭ la membroj de la Financa Komisiono. Flory Witdoeck ricevis 30 porajn voĉojn kun 1 sindeteno, Gianfranco Polerani resp. 29 kaj 2, kaj Josep Franquesa Sole 28 kaj 3.

Gazetara Komunikado de UEA n-ro 389

Kunvenaj raportoj

Komence pri kongresa temo

En la unua diskutsesio pri la ĉi-jara kongresa temo, Geoffrey Greatrex enkondukis la temon kaj prezentis kelkajn rilatajn demandojn. Poste intervenis mallonge Humphrey Tonkin, José Antonio Vergara kaj Philippe Chavignon, kiuj traktis kaj teoriajn kaj praktikajn aspektojn de la temo. Tiam pluraj kongresanoj proponis siajn proprajn opiniojn kaj demandojn. Oni multe diskutis unuflanke pri tio, ĉu oni parolu pri interproksimigo de kulturoj aŭ interproksimiĝo, aŭ eĉ eventuale de interplektiĝo. Aliflanke Chavignon proponis novan saluton, kiu estus tute kulture neŭtrala, por Esperantujo. Oni aliros ĉiajn aspektojn de la temo, sekvante la demandojn starigitajn de Duncan Charters en paĝo 4 de numero 1 de *Havana Karavano*, mardon en Lapenna je 13h45.

Unuaj kubaj/mezamerikaj prelegoj

Regis agrabla etoso dum la bone ĉeestata unua Kuba Prelego, de Mayra Núñez. Okazis interŝanĝaj momentoj de ideoj pri kubaj tradiciaj muzikiloj. Infanoj belege ludis ilin kaj mem instruis al kongresaj partoprenantoj pri ilia ludado. Post la fino de la prelego la ĉeestantoj restis en salono Hodler diskutante pri la diversaj kubaj muzikiloj. Forta aplaŭdo fermis kiel premion la okazaĵon.

Post kelkaj minutoj simile granda ĉeestantaro ĝuis la unuan Mezamerikan Prelegon, de Rubén Ortiz pri la kalendaro, tradicioj kaj sportkulturo de la majaa popolo en Mezameriko. Kadre de la prelego s-ro Ortiz montris du librojn verkitajn de li en la hispana lingvo pri tiu prakulturo; ambaŭ el kiuj estas aĉeteblaj en la kongresa libroservo. Ĉiuj interkonsentis pri la beleco de tiu kulturo kaj de la homa laboro por prizorgi ĝin.

José Luis Montes de Oca, KN 902

Shakespeare en multlingva mondo

Ĉirkaŭ cent homoj ĉeestis en dimanĉo la inaŭguran prelegon de la 63-a sesio de IKU, en kiu Humphrey Tonkin priskribis la procedon de la kreiĝo de la verkoj de Ŝekspiro en ilia kultura kunteksto. Per sia flua parolo kaj interesa maniero de prezentado li montris, ke malgraŭ la angla fono de Ŝekspiro, liaj verkoj iĝis internaciaj kaj fariĝis posedaĵo de la homaro. Oni ludas kaj ŝatas liajn teatraĵojn ĉie, tutmonde. Por interesatoj okazos du daŭrigaj sesioj de tiu ĉi temo: mardon je 09h00 en Canuto, kaj samhore vendredon en Lapenna.

Josef Shemer, KN 492

Tago de la Lernejo

mardon la 20-an de julio 2010, 10h00-16h00, salono Canuto; kunordiganto: Aurora Bute

Temo: La plezuro de lernado kaj instruado

I. MALFERMO: 10.00-10.15

0. Enkondukaj vortoj

Aurora BUTE, ILEI-komitatano

1. Saluto nome de ILEI

Stefan MacGILL, prezidanto de ILEI

2. Saluto nome de UEA

Claude NOURMONT, ĝisnuna estrarano de UEA, UEA-observanto ĉe ILEI

3. Saluto nome de la Kuba Sekcio de ILEI

Julián HERNÁNDEZ ANGULO

II. LA UNUA SERIO DE PRELEGOJ (LUDOJ)

1. Ebloj de rol-ludado

Stefan MacGILL, prezidanto de ILEI

10h15-10h35

2. Interkulturaj lingvaj ludoj

Mag. Radojica PETROVIĆ, estrarano de ILEI

10h35-10h55

3. Kartludo por instrui lingvan diversecon

D-ro François LO JACOMO, prezidanto de Kulturdomo de Esperanto-Kastelo Greziljono

10h55-11h15

III. LA DUA SERIO DE PRELEGOJ (INSTRUADO)

4. Plezure legi tekstojn en duagrada kursoj kaj lemi!

Prof. d-ro Renato CORSETTI, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio

11h15-11h45

5. Programeroj por lecionoj por progresantoj

Josef SHEMER, Sekretario de Esperanto-Ligo en Israelo

11h45-12h15

6. Laŭŝtupaj ekzercoj por parolkapabligi lernantojn

Prof. Julián HERNÁNDEZ ANGULO, prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio

12h15-12h35

7. La rektmetoda instruado kaj metodikaj helpiloj

Stano MARČEK, redaktoro de la revuo *Esperanto*, prezidanto de Slovaka Esperanto-Federacio

12h35-12h55

8. Spertoj en la instruado de Esperanto en Brazilo kaj en Kubo

Gonzalo COLLANTES

12h55-13h15 (paŭzo 13h15-13h25)

9. La Esperanto-Sumoo

HORI Yasuo, estrarano de Japana Esperanto-Instituto, ĝisnuna estrarano de UEA

13h25-13h40

10. Lingva talento, profesia kompetenteco, motivado kaj ties influo sur la E-lingvo instruado. Personaj travivaĵoj

Héctor Jiménez Batista, E-instruisto

13h40-13h55

11. Senseĝa instruado

Sylvain LELARGE, kunlaboranto de www.edukado.net

13h55-14h25

12. Gravaj novaĵoj ĉe edukado.net

D-rino Katalin KOVÁTS, redaktoro de www.edukado.net

14h25-14h55

IV. LA TRIA SERIO DE PRELEGOJ (PROJEKTOJ)

13. La projekto de Peni Vos, "Parolante al la tuta vasta mondo"

Jennifer BISHOP, direktoro de edukado por Aŭstralio Esperanto-Asocio

14h55-15h15

14. Lernetoj kaj la E-instruado

Radojica PETROVIĆ, estrarano de ILEI

15h15-15h35

15. Brilaj projektoj britaj

D-ro Geoffrey GREATREX, estrarano de EAB, nome de Angela Tellier, kunordiganto de la projektoj Lingvolanĉilo kaj Komenio

15h35-15h55

16. FRINGOJ 2011, niaj lernantoj estas artistoj!

Elizabet BARBAY, edukistino, lanĉinto de la Festa Renkonto Internacia de Geknaboj en 2006

15h55-16h00

V. FERMAJ VORTOJ (Stefan MacGILL)

Ateistoj administre

Dum la dimanĉa administra kunveno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo (ATEO), ĝia prezidanto Christian Rivière prezentis kelkajn elementojn de la funkciado de la asocio, ĝian bultenon, kaj la agadojn dum la jaro. Aparte notindas la kunlaboro de ATEO kun Internacia Asocio de Liberpensoj, fondota en Oslo, Norvegio en 2011. La kotizo de ATEO estas 15 eŭroj por unu jaro, sed estas aparta prezo de 10 CUC por B-landanoj dum la kongreso.

Subkomitato pri junularo

Kunvenintoj konsistantaj kaj el junuloj kaj el pli aĝaj kongresanoj formis laborgrupon por diskuti la bezonojn de la hodiaŭaj junaj esperantistoj kaj kiel UEA povus efike helpi al ili kaj ricevi pli da junuloj inter siaj membroj kaj en siaj kongresoj. En la kunsido formiĝis du rekomendoj, pri amasloĝejo kaj pri helpo al unuafojaj kongresanoj, kiuj estas prezentotaj al la Komitato de UEA en ties sekva kunveno. Aldone mallonge prezentiĝis ankaŭ TEJO kaj ties kongresoj (IJK).

Indiĝenaj Popoloj, Afrika Komisiono

Dimanĉon en salono Canuto Renato Corsetti enkondukis kaj Philippe Chavignon preparolis la nuntempan agadon de la projekto “Indiĝenaj Popoloj”. Partoprenis indiĝeno el Gvatemalo. Estis vaste debatataj la ideoj laŭ kiuj oni povus efike proponi Esperanton al indiĝenoj.

Horon poste en salono Jáki, trideko de ĉeestantoj en la kunsido de la Afrika Komisiono aŭdis raporton pri la agado de la komisiono kaj pri la afrika ILEI-agado de Radojica Petrović. Proponoj por plibonigi la afrikan agadon estis diskutataj.

Renato Corsetti, KN 412

Tutmondeca Esperanto

Renato Corsetti prezentis la laboron de la grupo La Bona Lingvo dum dimanĉa kunveno en Canuto. Poste prelegis Cvi Solt pri vortfarado en la hebrea, kaj José Antonio Vergara pri kriterioj por vere tutmonda lingvo. Josias Barboza parolis pri reviziado de lernolibro cele al forigo de novaj radikoj. La publiko, kiu konsistis el sepdeko da ĉeestantoj, estis interesata kaj faris plurajn rimarkojn.

Renato Corsetti, KN 412

Komunistaj diskutoj pri Kubo

La dimanĉkunvenaj diskutoj de Internacia Komunistika Esperantista Kolektivo (IKEK) temis precipe pri la gastiganta UK-lando Kubo, terorismo kontraŭ ĝi, kaj la kazo de kvin kubanoj malliberigitaj en Usono. Diskutiĝis ankaŭ elektoj en Kubo.

Omaĝo al Chong

Dimanĉposttagmeze en la libroservo raportis pri siaj impresoj kaj spertoj kun prof. Lee Chong-Yeong Michela Lipari (gvidanto de la kunveno), Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin (kiu estis en sama UEA-Estrarro), Edvige Tantin, Kim Young Myung, HORI Jasuo kaj Ivo Osibov. Estis bedaŭro ke ne pli da homoj partoprenis tiun ĉi interesan kunvenon.

Regiona Agado

Gvidate de HORI Jasuo, oni aŭdis raporton pri la ĝeneral situacio de regiona agado por Esperanto en la tuta mondo, kaj ankaŭ raportojn pri specifaj regionoj: Afriko (Renato Corsetti), Ameriko (Martin Schäffer), Azio (HORI Jasuo), Mez-Oriento kaj Nord-Afriko (Renato Corsetti), kaj Oceanio (HORI Jasuo, manke de la komisionano). Fariĝis klara al la partoprenantoj la situacio en diversaj lokoj en la tuta mondo.

Ĝemelaj Urboj

Komence de la kunsido en salono Broccatelli, HORI Jasuo prezentis la situacion kaj celojn de “Ĝemelaj Urboj”. Kvankam urboj en kiuj la partoprenantoj loĝas havas siajn ĝemelajn urbojn, ali ili mankas spertoj pri tiu agado; do babilado daŭris rilate al tiu temo, kaj kelkaj partoprenantoj esprimis deziron ke ilia urbo ĝemeliĝu kun alia en la mondo. Kontraste al pasintjare, mankis raportoj pri personaj spertoj rilataj al la projekto.

Aŭtoraj Duonhoroj

Ĉiuj Aŭtoraj Duonhoroj okazos en la libroservo.

Malgraŭ la manko de antaŭanonco en *Havana Karavano* (pri kio la redakcio bedaŭras – ĉiuj sekvaj ja estos anoncigitaj, vd. unuan sube), dekoj da kongresanoj ĉeestis la unuan oficialan Aŭtoran Duonhoron dimanĉon posttagmeze je 14h30. Spomenka Štimec el Kroatio kaj Probal Dasgupta el Hinda Unio prezentis en la libroservo tradukprojekton dum la Aŭtora Duonhoro. La projekton financis Eŭropa Komisiono. Per la projekto tri libroj el infana literaturo de Italio, Kroatio kaj Slovenio estis tradukitaj per Esperanto al la bengala lingvo. Paralele bengala libro *La vivo de Damoru* estis tradukita per Esperanto al la slovena, kroata kaj itala lingvoj. Finance subtenis la projekton Esperantic Studies Foundation (ESF), la ministerio pri kulturo de Kroatio, kaj la urbo Zagrebo.

Anna Löwenstein



Verki romanon estas kiel kuri maratonon. Oni komencas esperplene, post du trionoj de la vojo oni timas ke oni neniam atingos la finon, kaj la plej plezura momento venas kiam finfine oni haltas. Ŝvitante kaj ĝemante, **Anna Löwenstein** verkis du romanojn, *La ŝtona urbo* kaj *Morto de artisto*, kaj (malpli ŝvite) plurajn artikolojn, tradukojn ktp. Ŝi mencias precipe siajn du libretojn pri landonomoj: *Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto* kaj (kiel redaktoro) *Rusoj loĝas en Rusujo*.

Lundo 19 julio, 16h00-16h30

Programaj anoncoj

Filatelo kaj Esperanto

Renkontiĝo de filatelistoj kaj esperantaj-kolektantoj okazos mardon, la 20-an, je 16h00 ĉe la enirejo de la kongresejo. Simpatiantoj kaj scivolemuloj estas same bonvenaj.

Edvige Tantin Ackermann, KN 335

Spiritisma prelego

Brazila Spiritisma Federacio kaj Eldonejo Lorenz anoncas "Ĉu mia konscienco anesteziigis?" kiel temon de prelego prezentota de d-ro Paulo Sergio Vrana el Brazilo, mardon je 09h00 en salono Lapenna. Ĉiu kongresano estas invitita ĉeesti. Okazos ankaŭ lanĉo de Almanako Lorenz 2010.

Danckurso/Kabaredo

14h45-15h45	Danckurso 2
15h45-16h00	Paŭzo
16h00-16h10	Batas tamburoj (Margarita Diaz); folkloro dancado: Orisha Obbatala (Karel Garces)
16h10-16h30	Aktoras Pedro Fernández (speciale rakonto pri Obbatala); Simon Carlos kaj Cristina Palomino kune kun la Parolkoruso; speciala temo pri la paco
16h30-16h50	Gitaristoj Jessica kaj Janet Menéndez
16h50-17h00	Kantistino Miriam Casals
17h00-17h20	Pianisto Joel Romero
17h20-17h30	Klubo pri rakontoj; proverboj
17h30-18h00	Muzikensemblo "Kordoj el Havano"

Lundo 19 julio, 14h45-18h00, Magnani

Salutmesaĝo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof

Sinjoro alta protektanto, sinjoro prezidanto, gesinjoroj honoraj gastoj, estimataj gekongresanoj, geamikoj karaj,

Saluton al vi, alvenintaj de landoj malproksimaj al la gastama urbo de Havano, alvenintaj por diskuti kaj, sekve, por progresigi la interproksimigon de kulturoj.

Bonvolu aŭskulti ĉi tie kelkajn vortojn de maljuna nepo de Avo eterne juna, Avo kiu nian belan lingvon iniciatis ĝuste por kulturojn interproksimigi. Lingvo ja estas vehiklo de kulturo. Tial, laŭ onidira observo de Ludoviko gapvaganta sur la Bjalistoka vendoplaco, malamikeco ekzistis inter malsamlingvanoj sin reciproke ne komprenantaj; malamikeco kaj malkompreno bremsantaj interproksimigon de respektivaj kulturoj de tiuj malsamlingvanoj.

Kontraŭe al la iama Bjalistoka vendoplaco, nia Kongreso Universala estas teatro de kultura interproksimigo kaj ni, esperantistoj, ni de tiu interproksimigo estas la aktoroj. Ne nur pro malekzisto inter ni de lingvaj baroj, sed ankaŭ pro la neŭtraleco de nia lingvo Esperanto, dua lingvo por ĉiuj neniel celante ian ajn nacian lingvon anstataŭigi.

Mi forte deziras, kiel vi ĉiuj, ke la Havana Kongreso estu signifa paŝo sur la vojo de kultura interproksimigo .

Noto de UEA-estrarano HORI Jasuo: "Estis mia granda honoro ke oni donis al mi la taskon anstataŭlegi la mesaĝon de Zaleski-Zamenhof. Komence de tiu ĉi jaro mi decidis tralegi la serion de Plena Verkaro de Zamenhof (PVZ), kompilitan de s-ro Ito Kanzi kaj konsistantan el 54 volumoj. Preskaŭ ĉiun tagon mi legas kaj legas PVZ-on kaj nun mi legas la 7-an volumon. Mi aĉetis tiun serion jam antaŭ pli ol dek jaroj, sed la serio silente sidis en mia ŝranko. Mi jam estas 68, kaj la morto pli kaj pli proksimiĝas. Kiam mi iros al la ĉielo kaj renkontos d-ron Zamenhof kaj s-ron Ito, kion ili diros al mi? Eble ili diros: 'Vi diras ke vi estas esperantisto, do kial vi ne legis la serion de PVZ?' Mi hontos tion, kaj decidis lukti kontraŭ tiu ampleksa serio. Kiam oni nomumis min kiel anstataŭleganton de tiu ĉi mesaĝon, mi sentis kvazaŭ d-ro Zamenhof kaj s-ro Ito kuraĝigus min pri mia decido. Mi praktikis la legadon por ke ĝi sonu bele kaj imprese. Ĉu mi sukcesis?"



Festparolado de Probal Dasgupta ĉe la Solena Inaŭguro de la 95-a UK

Estimata s-ro Alta Protektanto, estimataj eminentuloj
sur la podio kaj en la salono, estimataj kongresanoj,



Bonvenon denove al la ĉiujare mirakla Universala Kongreso. Novaj kongresanoj, precipe homoj neniam antaŭe aliĝintaj al internacia Esperanta aranĝo, trovas en sia unua UK personan sperton pli superŝutan ol ili imagis. La eterna homa deziro atingi transbaran, transmaran kaj tamen personan amikecon aparte pure esprimiĝas en niaj kongresoj.

Ĉi-jare la kongreso suplementas sian kutiman bonvenigon per io tute speciala – Unuiĝintaj Nacioj deklaris ĝuste la 18-an de julio kiel la Internacian Tagon de Nelson Mandela. Ke ni inaŭguras kongreson ĝuste en unu el la landoj de la monda sudo en la 92-a naskiĝa datreveno de tiu granda sudafricano, kiu kontribuis al la interproksimigo de la kulturoj kaj kontribuis al la paco en la multlingva, multetna Sudafriko, estas datkonverĝo tute aparte priĝojinda. Ni ĉiuj scias, ke lia ĉielarka Sudafriko inde gastigis la mondpokalan futbaladon, kie la fina ĉampioniĝo de hispanlingvanoj eble varmigis iujn korojn en ĉi tiu mondparto!

Sed pri tiu temo ni parolos tuj post mia parolado. UEA sendos mesaĝon al Nelson Mandela, kiel ni klarigos. Ĉi-momente ni revenu al la bonvenigado al niaj unuafojaj kongresanoj. Tiuj niaj unuafojuloj evidente neniam forgesos sian sperton. Sed al kiuj ili plej ŝuldas tiun ĉi sperton neforgeseblan? Ĉefe al tiuj inter vi, kiuj estas veteranoj, kiuj dudek aŭ kvardek aŭ kvindekfoje kongresis, kaj kies senmanke varma *veterana* ĉeesto fasonas agrablan *veteron* de la unika esperantista medio de amikeco trans la kontinentoj, la insuloj, la polusoj kaj la tropikoj, inter kiuj ni cirkulas kongrese. Al vi veteranoj ni esprimas nian koran dankon; ni dankas vin en Esperanto – en lingvo de kontrastoj kaj de simileco.

La similoj kaj la malsimiloj ambaŭ grave rolas en la amikeco. Kial donas al mi plezuron veni al tiu ĉi lando el mia same tropika lando? Pro la simileco inter Kubo kaj Barato. Tamen, ĉu ni kontinentanoj ofte vizitas insulojn? Ne, kaj tiu faktoro instigas min dum tiu ĉi vizito pensi

al aliaj insuloj. Tiun mian kontinentanan kontentiĝon mi ŝuldas ĝuste al la kontrasto.

Kial mi subite elokventas pri kontrastoj kaj mal-kontrastoj? Nu, vi scias, ke la ĉi-jara kongreso temas pri la interproksimiĝo de kulturoj en multlingva mondo, ĉu ne? Ni bezonas tiel la similojn kiel la malsimilojn. Se ni ne estus dekomence almenaŭ iugrade similaj, tiam ni neniel seĉ komencus reciproke proksimiĝi. Aliflanke, se ni tro similas, aŭ sukcesos tro similiĝi, tiam ni per tia interproksimiĝado nur tedados unu la alian. Hodiaŭ ni scias, ke sur planedo feliĉe multlingva ĝuste nia investo pri la diverseco garantias, ke ni nepre ne fariĝu tro similaj, ĉu ne?

Tiu ĉi ideo estas iom nova por ni ĉiuj. Antaŭe la idealistoj kutime pledis por idealoj unuecigaj. En unu lando ili pledis por nacia unuecigo. Sur la monda skalo ili strebis al harmonio, kiun ili komprenis kiel sendivide, sendiference unuecigitan homaron. Sed ni hodiaŭ lernas deziri unu konektitan planedon, kiu estimas kaj flegas ĝuste la diversecon. Tiu ĉi lernado okazas ne nur en Esperantujo: la media katastrofo devigas nin serĉi vojojn por savteni la vivdiversecon kaj disvolvi aliajn parencajn diverseco-ideojn. Sed ni esperantistoj jam de longe pioniris, kaj veterane kultivas, similan kampon. Ni laboras por savteni la diversecon de konversacioj.

Ni aspiras al tutplaneda konversacio inter la lokaj kaj regionaj konversacioj, kiu savtenas ilian lokan kaj regionan vigecon kaj pere de ili la demokration.

En 1888 Zamenhof transdonis la taskon pludisvolvi sian lingvan prototipon al la publiko uzonta lian novnaskitan projekton. Ekde tiu mejloŝtona jaro la esperantista komunumo evoluigis tiun ĉi idealon novan por la homaro. Kaj kiom ni progresis en tiu disvolva laboro? Kion nia unike esperantista konversaciado ĉerpis el la fonto ofte nomata la globa sudo – el Kubo kaj aliaj landoj de Latinameriko, Afriko kaj Azio?

En la fruaj jaroj de la esperantista konversacio, ne havis reliefan lokon la sudaj voĉoj. La prahejmoj de la Esperanta lingvo-kultivado – Rusujo, Svedujo, Francujo – dialogis kun aliaj orient- kaj okcidenteŭropaj socioj, kiuj ĉeftrafikis ĉirkaŭ tiu akso. Ankaŭ kiam la Esperanta literaturo serioze floris, ni vidis prosperi sinsekvajn hungaran kaj skotan skolojn post la respektivaj mondmilitoj. Iliaj revuoj gastame akceptis kontribuojn ankaŭ el la sudaj landoj. Tamen ili eble ne plene komprenis, ke la konsisto de la monda konversaciantaro ŝanĝiĝas, kaj ke tial ankaŭ nia unika kultura konversacio inter kulturaj konversacioj devas remuldi sin laŭ tiu nova konsisto.

(*daŭrigota*)

Ankaŭ IKU-prelego de Raola certe prezentota

Same kiel anoncite dum la Solena Inaŭguro pri la IKU-prelego de Duncan Charters, kiu ne ricevis permeson de la usona registaro veni al Havano por la UK, tiu de Orlando Raola (vd. Kongresan Libron, p. 57-58) nepre prezentiĝos ĉiukaze, vendredon je 10h15 en salono Lapenna. Se s-ro Raola ne sukcesos atingi la kongreson, voĉlegos lian prelegon Amri Wandel, KN 915.

Gazetoteko Lanti

Esperantisto, kiu venas al UK: Kion vi povas fari por la estonteco? Kiel oni povos danki vin en la estonteco kiel esperantiston kaj respektanton de nia kulturo? Venu al prelego pri la Gazetoteko Lanti (14h30 mardon, Jáki) kaj lernu pri kio ĝi estas, kiel ĝi aperas, kaj kiumaniere vi povas helpi konservi nian trezoron por la estonteco. Dankon.

Jesuo de las Heras, KN 400

Kuba Mozaiko en la koncertkafejo

UNUA PARTO

11h00-12h00 Spektaklo *Esperanto por ĉiam* (Georgina Almanza)

DUA PARTO

14h00-14h15 Muziklernejo "Kubo-Kanado" (tradicia muziko)

14h15-14h30 Juna ensemblo de muziklernejo "Alejandro García Caturla"

14h30-14h45 Pianisto Joel Romero

TRIA PARTO

14h45-15h45 Danckurso 3

15h45-16h00 Paŭzo

16h00-16h15 Batás-tamburoj (Margarita Díaz); folkloro dancado: Orishas Oshun (Jessica Menéndez), Yemaya (Janet Menéndez)

16h15-16h40 Klubo pri rakontoj kaj poemoj (Pedro Fernández Rodríguez, Pedro Fernández Pérez, Ismarys Lezcano, Roberto Nuñez kaj Sonia Maria Gley)

16h40-17h10 Muzikensemblo "Amindaj"

17h10-17h30 Kapoeira Dancensemblo

17h30-18h00 Orkestro Kubaj Steloj; kantistino Ivette Letusé

Mardo 20 julio, Magnani

Italoj italu

Venu al la akcepto de la itala ambasadoro, vendredon je 18h30 en la manĝejo de Hotelo Palco. Estas atendataj 45 personoj – bv. do kunporti "honorajn italojn", ekzemple neitalajn amikinojn.

Renato Corsetti, KN 412

Verduloj

"Kion ni povas fari por bremsi la klimatan ŝanĝon?" Tio estos certe unu el la temoj pritraktotaj dum la kunveno de Asocio de Verdulaj Esperantistoj (AVE), vendredon je 14h45 en salono Broccatelli.

Havebla en la kongresa libroservo estas libro ĵus eldonita pri tiu temo: *Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj*.

Vilhelmo Lutermano, KN 151

Du korusoj en kongreso:

Internacia Koruso kaj Interkant'

Ĉi-jare du korusoj kongresas. Gravus precizigi kion, kiam, kaj kie ili provkantas.

La *Internacia Koruso* prezentos tri kantojn: "United Fruit and Co.", "Ameriko insurgenta" kaj "Tropika parfum". Provkantoj okazos mardon je 17h00 en Hodler kaj vendredon je 16h30 en Lapenna.

Interkant' kantos mardon 20 julio je 09h30 en Magnani, merkredon je 10h00 en Hotelo Acuario, kaj ĵaŭdon je 16h00 en la Nacia Teatro (buso ĉe la kongresejo je 15h30).

Franjo Levêque, KN 538

ILEI-rezolucio

La 43-a Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kunveninta 60-ope el pli ol 20 landoj 11-17 julio 2010 en Matanza, Kubo, traktinte la temon "Edukado por kultura proksimiĝo", esprimas sian apogon al la UN-iniciatoj kiel la Mondaj Tagoj de la Oceanoj kaj de la Paco, atentonte la iniciatojn en sia instruado, kaj substrekas la gravecon strebi trovi solvon de la mondaj konfliktoj prefere al armila intervenado per paca intertraktado en neŭtrala egalrajtiga lingvo surbaze ankaŭ de samrajtigo de la tutmondaj ekonomiaj rilatoj. Nome Esperanto delonge pruviĝis konvena rimedo kiel interkomprenilo, taŭga por konsciigo pri nia respondeco pri la komunaj valoroj materiaj kaj spirita.

Decidite en la 17-a de julio 2010.

Unua komitatkunsido – aliaj aspektoj

Post kontroli la komitatanojn kaj observantojn, oni decidis kaj konkludis ke estas forumo por kunveni. Ili ankaŭ akceptas la tagordan proponon kaj elektis kandidatojn por la Estraro nova de UEA. En la raporto estas rimarkigo pri la nuna kuba koĉo por fari la UK-on, kaj la opinio estas ke je la komenco a kongreso estas kvalifikita tre bone. Oni diskutis kaj analizis la kvanton de estraranoj. La fina decido estas ke la Estraro de UEA havu nur unu vicprezidanton kiam ĝi sinprezentos mardon matene. Juliano Hernández, prezidanto de KEA kaj LKK, informis pri la preparlaboro lande. Oni ankaŭ analizis la anoncan liston pri salutoj el la diversaj landaj reprezentantoj dum la inaŭguro. Post dekminuta paŭzo, ili prezentis la novan Estraron de UEA. Alia grava temo estis la komisiono pri financo de UEA. Ili voĉdonis pri tiklaj punktoj de la interna laboro de UEA, kiel la akcepto de novaj landoj kaj fakaj organizoj ktp. La strategia plano de la asocio provokis diversajn kaj akrajn komencojn flanke de la kunvenaj partoprenantoj. Kun tiu ĉi diskuto finis la unua komitatkunsido de UEA en Havano, Kubo.

Mario Ruiz Karell, KN 912

Ekumena Diservo

Malgraŭ malfacilaĵoj pro lastmomenta ŝanĝo de la loko, la Ekumena Diservo de la UK sukcese okazis dum dimanĉo ekde 15h00, celebrita de pastro Peter Knauer (KN 487) en la preĝejo Jesús de Miramar kun ĉeesto de kvardeko da kongresanoj. Anoj de pluraj religioj unuiĝis en preĝo kaj kantado kaj aŭskultis originalan esperantlingvan homilion pri la evangelia legaĵo.

Marek Blahuš (KN 855)

Nacia Vespero

La spektantoj ĝuis agrablan kaj interesan Nacian Vesperon. Kritikpunktoj estas malmultaj. Temis pri plej diversaj muzik-prezentoj, sed eblas diri ke mankis prezentado de kuba kulturo. Oni povus pensi pri recitado de poemoj, literaturo kaj eble prezento de kubaj dancoj. Tre plaĉis grupo de junuloj kiuj dancis kaj faris ritmajn sonojn nur per la korpo kaj manoj. Ankaŭ tre bona prezento estis la fina, en kiu kantistino plej bele kantis.

Martin Schäffer, KN 430

Estis trovita sumo de kubaj pesoĵ en la koridoro antaŭ la ĝiĉetoj en dimanĉo ĉirkaŭ la kvina horo posttagmeze. Se estis vi kiu perdis ĝin kaj vi povas indiki pri kiom temas, la mono estos redonita al vi ĉe la ĝiĉetoj.

Esperantaj dezertoj...

Dum prezento en la Kleriga Lundo, Martin Schäffer parolis pri agado en Suda Ameriko kaj pri la vojaĝo entreprenota de juna belga esperantistino. HORI Jasuo parolis pri la agado de KAEM, la Azia Komisiono de UEA, en aziaj landoj. Renato Corsetti parolis pri la situacio en arablingvaj landoj. Estris grand interesiĝo de la centkapa publiko.

Renato Corsetti, KN 412

...sed ekvadora semo

Bedaŭrinde, en Ekvadoro ne estas Esperanto-asocio. Tamen jam estas inter ni la unua semo, pere de la junulo Iván Ricardo Landivar (KN 797). Li estas komencanto, sed kuraĝe parolas Esperanton. Li rezistas uzi sian gepatran hispanan, eĉ ĉi-kongrese kie estas tiom konvene tion fari. La 95-a UK estas lia unua sperto pri la graveco de nia movado. "Tiu ĉi grava internacia evento estos neforgesebla por mi", li diris. "Ĝi estas montro de la vera alproksimiĝo inter naciaj kulturoj. Ĝi estas montro de homa interkompreniĝo kaj senlima amo." Poste li aldonis: "Mi ĉiam laboros en tiuj celoj." Ni gratulu kaj bonvenigu al sinjoro Iván.

José Luis Montes de Oca, KN 902

Lerni ludante

Cento da kongresanoj ĉe la prelego de Ana Montesinos (KN 647) en la Kleriga Lundo lernis serioze, sed ridante, manierojn por faciligi la lernadon de Esperanto per diversaj ludoj, inkluzive de loterio. Partopreno estis centprocenta, kun absolute ĉiuj en salono Broccatelli farante ion dum la klaso. La montrata luda metodo ankaŭ pruvis, ke instruistoj ne bezonas uzi gepatran lingvon de la gelernantoj por igi ilin lerni. Ekzemple, mi porĉiame lernis la vorton *krabo* per tiabesta premio, kaj *karamelo* per premiita ekzemplero de tio, pro mia ĝusta respondo "akvo-melono" al prezentita demando. Nia prelegantino bone montris sian instruan lertecon kaj bonhumoron. Dankon Ana!

José Luis Montes de Oca, KN 902

La kongresanoj, kiuj mendis ĉambron en Hotelo Palco rekte per la retejo hotelpalcodecuba.com bonvolu kontakti KN 217 (Marc Bavant) por interŝanĝo de spertoj kaj komuna ago. Poŝtel.: +33 6 33 35 53 18.

Kio estas Oomoto

Regis bona etoso en la lunda Oomoto-kunveno, ĉeestita de pli ol 50 homoj, diversaj el kiuj esprimis siajn sentojn pri la Oomota idealo. Parolis interalie Atilio Orellana Rojas, Amri Wandel kaj Ana Montesinos, ĉiuj informante dum kelkaj minutoj pri a influo de la sperto de Oomoto en siaj vivoj.

Roberto Torres, KN 766

Saniga Lundo

Dum la programero pri Yumeiho-terapio dum la Kleriga Lundo (vd. n-ron 2 de *Havana Karavano*), la terapio estis prezentita ne nur per priskriboj de ĝia teorio pri pezcentro kaj de kazoj de efikaj kuracoj, sed ankaŭ praktike, kun kelkaj partoprenantoj ricevante la kuracon mem kun plezuro, kaj farante rekomenditajn ekzercojn por plibonigo de la sanstato laŭ Yumeiho-maniero. Fakte multaj el la kvindeko da ĉeestantoj volis same ricevi la terapion, sed bedaŭrinde la tempo ne sufiĉis por ĉiuj.

Fráncel/Francisco Briel, KN 676/677

Kuba geografio

La tria Kuba Prelego celis oferi ĝeneralan bildon pri Kubo ekde fizikogeografia vidpunkto kaj ankaŭ inkluzivis niajn naciĝn simbolojn. Post la fino de la prelego oni proponis demandojn al la partoprenantoj pri ajnaj duboj aŭ demandoj rilate al nia lando.

Gonzalo Collantes, KN 900

Paroligaj Lecionoj kun edukado.net

La preleganto havas sian propran pedagogian metodon por gvidi la agadon. Li interŝanĝas opiniojn, ideojn kaj kriteriojn dum la tuta tempo de la prelego. Ni ne nur lernis, sed ankaŭ amuziĝis. La instruisto ankaŭ ofertis helpon al la blindaj kaj handikapitaj ĉeestantoj. Multaj el la ĉeestantoj opiniis tiun ĉi horon la plej bona kaj interesa evento de sia kongreso ĝis nun.

Yoandris Pompa Valdespino, KN 697

Kleriga Lundo – Muzikiloj

Dum la Kleriga Lundo okazis seminario pri muzikaj instrumentoj en kiu HORI Jasuo tre lerte kaj amuze prezentis sian vastan kolekton de diverslandaj muzikiloj. Ni provis diveni el kiuj landoj ili originas kaj ankaŭ kelkaj el ni provis muziki. Tio ne ĉiam estis facila. Regis bonega etoso; oni multe ridis kaj ŝercis dum la tuta kunveno.

Liba Gabalda, KN 330

Aŭtoraj Duonhoroj

Geoffrey Sutton



Geoffrey Sutton estas esperantisto jam dum 48 jaroj. Li tiel malsaĝe aranĝis sian vivon, ke li ne sole naskiĝis anglo, sed trifoje profesie laboris por Esperanto – dufoje ĉe UEA kaj unufoje ĉe la redaktejo de la ĉina gazeto *El Popola Ĉinio*. Nun li redaktas kvaronjaran bultenon por Esperanto-Asocio de Britio. Li volonte respondos al demandoj pri sia 740-paĝa anglalingva enciklopedio pri la Esperanta literaturo, kies preparado postulis sep jarojn da laboro.

Mardo 20 julio, 16h00-16h30

Aŭtoroj de lernolibroj



En kiom da lingvoj **Stano Marček** (Slovakio; en foto) jam eldonis sian libron *Esperanto per rekta metodo?* Venu al la libroservo mardon por ekscii (17h00-17h30). Ankaŭ **Josias Ferreira Barbosa** (Brazilo) prezentos sian novan libron, la duan kaj lastan volumon de la serio *Esperanto por lernejoj klasoj* (17h30-18h00).

Mardo 17h00-18h00

Transporto por la vesperaj aranĝoj ekster la kongresejo

MARDO

(Teatra Vespero – Teatro Nacional)

Ekiro de la kongresejo: 18h45

Reveno al la hoteloj:
je la fino de la prezentado